

Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 37^{an} jaro

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k135/k135.html>

*Quod omnes tangit ab omnibus approbari debet.
Tio, kio tuŝas ĉiujn, aprobendatas de ĉiuj.*

Se en Hispanujo estus demokratio...



Pacismo kiel misvaloro ideologia de sklavoj

N^o 135^a

Aprilon de 2025^a

Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3^o D
30010 Murcia
Hispanio

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**

**Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Nesubskribitajn artikolojn
verkis la redaktoro.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni
trovos interesa .**

Enhavo

Redaktore: Ĉu laboro estas morto?.....3

Humuro: Bonvolu ridi, sed ne tro!.....5

Politiko: Akvo.....6

Trilogio pri la Enlanda Milito.....8

Pacismo kiel misvaloro ideologia de sklavo. 11

Se en Hispanujo ekzistus demokratio.....21

Beletro: Recenzo.....10

Sireno de Serenin':

1 Enkonduko.....13

2 Mi, Serena.....14

3 Kapto.....16

Defendo de Hispaneco:

Gŭaranaj misioj.....24

Filipinoj kaj Oriento.....26

Kovrilo: Sur muro de antikva bankosidejo legeblas: **Devigataj labori, kondamnataj morti.** Ĉu laboro estas kondamno, ĉu beno? Kaj la aserto estas subskribita, laŭŝajne, de *Iniciato Komunisma*, kion ajn tio signifas. Ni analizos la aferon en niajn paĝojn.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10
jare por ricevi la surpaperan version de nia
magazino.

**Se vi deziras kontibui per aliĝo,
kontaktu la redaktoron:
kajeroj@gmail.com**

**Oni povas reprodukti la enhavon,
kondicë, ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuxaj rimedoj: **Scribus,**
Bluefish, LibreOffice, Gimp, kaj Yafc.

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.



Redaktore

Ĉu laboro estas morto?

Bedaŭrinde ne povis mi paroli al subskribantoj de tiu slogano.

Ŝajnas, tamen, ke oni ne plu konsideras, ke laborposteno estas beno, sed malbeno. Eble oni denoncas per tio averto pri malbonaj aŭ malsekuraj kondiĉoj de manlaborpostenoj, sed tio ne evidentiĝas.

Mi reserĉis pri tiu 29-O, kaj trovis, ke tiun tagon okazis politika manifestacio en Valensjo petante demision de Prezidanto de ties Aŭtonoma Komunumo, ĉar li ne estis ĉe sia posteno dum valensjanoj mortos en kelkaj urboj de tiu regiono, nome Pajporta, Alfafar, Benetússer, Chiva, Massanassa, Sedaví, La Torre, Alaquás, Albal, Aldaia kaj Algemesí. Eble mi forgesis mencii aliajn, sed leganto jam havas ideon pri la grandeco de tiu katastrofo.

Sekve, mi ne komprenas la rilaton inter devigo labori kaj tiu grava katastrofo. En Pajporta ne pluvis tiun tagon, sed subite venis inundo tra Ravino El Pojo, kiu forpuŝis autojn kaj homojn direkte maren, kaŭzante morton kaj ruinigo de urboj kaj homoj. Ĝis nun oni kalkulas pli ol 200 mortintoj, eble estas multaj pli, kiuj ankoraŭ ne aperis.

Kaj la krimo de Prezidanto Mazon' ŝajnas ne esti trovebla kiam tio okazis.

Eble li estis kun nekonfes ebla

rilato sia, eble li faris ion ne diskutebla publike..., kio gravas? La afero grava, laŭ mi, estas, ke kiam prezidento ne estas, devas esti protokolo por ke alia funkciulo *funkciu* tiel ke la problemon oni solvos.

Aliflanke, Prezidanto Bukele de El Salvador ofertis taŭgan kaj oportunan helpon, sed Ministro Grande-Marlaska, kiu devintus sendi la armeon hispanan en la katastrofan lokon, rifuzis, dirante, ke *ne necesas*. Dume, tamen, valensjanojn mortis tiun 29^a de Oktobro 2024^a. Poste la registaro de Hispanio diris, ke ili ne povis interveni ĝis kiam la prezidanto de la Aŭtonoma Komunumo tion petos! Sed kiam temas pri nacia katastrofo, la nacia registaro devas interveni rekte, ĉu kunpete aŭ senpete!



Sed temis pri vundigo al rivala politika partio. Mi scivolas, kio okazintus, se la registaro de la Aŭtonoma Komunumo apartenus al la sama partio politika, PSOE, kiel tiu de la registaro de Hispanio. Certe la helpo venintus tuj, ĉu per peto aŭ sen peto de la prezidanto de la Aŭtonoma Registaro.

Tiu partio subskribante la muraverton komentitan estas Komunisma Iniciato estas certe amika al registaro, la Socialisma Partio PSOE, kaj evidente miksas la du aferojn, la tragedion valensjan kaj la laborkondiĉojn, kaj sen klarigi la rilaton, ili uzas tion por altiri simpatian de popolo; sed tamen tiom turpe, ke oni ne vidas la rilaton kaj la mesaĝo turnas sin kontraŭ ilin mem. Mi skribis al ili kaj petis klarigon, sed klarigo ankoraŭ ne venis.

Mi ne povas ne pensi, ke ĉifoje okazis morto de granda kvanto da civitanoj pro neago de la registaro, kaj estas respondecio politika nek aŭtonoma nek nacia. Kaj ega tragedio estas, ke nek unu nek la alia devige devas respondi antaŭ la civitanaro, ĉar la manko da demokratieco en nis lando estas tia: ke politikisto povas fari ĉion, eĉ lasi morti civitanojn, kaj ade resti ĉe siaj oficoj. Eble juĝistoj povos peti respondecon, eble

juĝistoj povos fari ion, sed ne civitanoj. Ĉar civitanoj kredas, ke demokratio konsistas el nur voĉdono ĉiun jarkvaron, kaj du me politikistoj povos fari ĉion ajn, kion ili volos. Se ili rabas, juĝistoj nomumitaj de politikistoj povos vidi al aferon, se ili ne plenumas siajn devojn, oni povos protesti iomete en amasmedioj kontrolitaj de la registaroj pere de la mono kolektita de niaj impostoj, sed la komuna civitano faros nenion, ĉar *diskutoj politikaj estas neoportunaj kaj kondukas al nenio krom malamikiĝo...*

Kaj mi ne povas ne pensi, ke la problemoj pri la nedemokratio en Hispanio ne okazas pro tio, ke ni havas senhontajn politikistojn, sed nur pro tio ke komunaj civitanoj senhonte asertas, ke politiko ne rilatas al ili mem. Sed se politiko ne rilatas al civitanoj, demokratio tute ne ekzistas, ĉar demokratio signifas, ke regas la popolo. Kaj se la popolo rifuzas regi, okazas oligarkio aŭ diktatoreco, kio signifas, ke ĉiun povon restas je la mano de nur unu persono, aŭ elito fia..

Do, ĉu ni deziras tion por Hispanio: diktatoreco?

Jesuo, redaktoro.

Humuro**Bonvolu ridi, sed ne tro!****Ĉe lernejo:**

—Infano, kia estas ideala lernejo, laŭ vi?

—Fermita!

Sincera opinio:

Diras edzino al edzo:

—Mi sentas, ke mi estas maljuna, malbela kaj maldika. Kio estas tio, karulo?

—Pravo.

Hejmtasko:

Demandas filo al patro:

—Paĉjo, kiel skribi *sonorilo*?

—Same kiel oni aŭdas, filo.

—Dankon.

Kaj li skribas: *tolon', tolon'*.

Edzina vivo:

Demandas enketisto ĉe hejma pordo:

—Sinjoro, kiel vi nomiĝas?

—Adamo.

—Kaj via edzino?



—Eva.

Surpri-
zata enke-
tisto aldo-
nas:

—Ĉu eble
loĝas
serpen-
to ĉe vi
ankaŭ?

—Ne, bo-
patrino
ne loĝas
kun ni.

**Patrino respondo:**

Demandas filo al patrino:

—Panjo, de kie ni venas?

—De Adamo kaj Eva, filo.

—Sed instruistino hodiaŭ diris,
ke ni venas el simio!

—Nu, mi scias pri mia familio,
ne pri tiu de via patro, kara.

Serĉante laboron:

Funkciulo demandas al kan-
didato:

—Sinjoro, kiu estas via fako?

—Mi mortigas drakojn.

—Sed tiuj ne ekzistas!

—Ne plu: mi mortigis jam ĉiujn.

Piedpilke:

—Kio estas 4 x 4?

—Remiso!

Politiko


Akvo

Ekde romia tempo, diversaj projektoj estis efektividigitaj en kio nun estas Hispanio por transporti akvon de tie, kie malmankis ĝis tie, kie mankis. Poste, araboj daŭre konstruis irigaciajn fosaĵojn kaj aliajn diversajn verkojn cele solvi la saman problemon. Kaj tiel ni venas al la epoko de la **Dua Hispana Respubliko**, kiam la afero estis prenata pli serioze, pere de **Nacia Hidrologia Plano**, apogata antaŭ ĉio de la socialistoj, kiel pruvas la vortoj de Indalecio Prieto, deputito de PSOE kaj Ministro pri Publikaj Konstruoj de la Registaro je 1933:

Ĉi tio ne estas laboro farenda en tre mallonga periodo de tagoj aŭ monatoj; Ĝi estas la laboro de jaroj, kiu postulas la helpon de tiuj, kiuj regas hodiaŭ, de tiuj, kiuj estas en la opozicio, de tiuj, kiuj servas al la respublika reĝimo kaj, atente aŭskultu, de tiuj, kiuj kontraŭas ĝin; Ĉar tiuj, kiuj, subtenante la respublikan reĝimon, rifuzas al ĝi sian helpon kaj apogon, ne estus malamiko de la reĝimo, sed mizeraj perfiduloj al Hispanio.

Tri jarojn poste venis Intercivitana Milito, kaj tiun konstruaron oni ne eblis fari, ĉar ĉiuj estis okupataj pri la malkonstruo de

Hispanio. Sed post la milito, la problemo persistis, kaj eĉ sub diktatoreca reĝimo evidentiĝis, ke ne estas juste, ke malseka



Ministro Indalecio Prieto.

Hispanio ĵetos en maren akvon, kiun oni bezonas en malseka parto de la lando, kaj sekve la diktatorecaj aŭtoritato decidis realigi la planon de la respublika ministro. Tial la tiamaj aŭtoritatoj decidis efektivigi la planojn de la respublikana ministro, kaj tiucele ili komencis konstrui serion da digoj, akvorezervujoj kaj akvoduktoj en tiuj partoj de Hispanio, kiuj tiom bezonis ilin, tio estas de la Nordo ĝis la Sudoriento.

Je la fino de la diktatoreca periodo de la historio de Hispanio, ni havis dekoblon da akvodigojn kaj akvotranslokigojn ol dum la antaŭaj 2000 jaroj. Sed..., kio okazis

fum la tiel nomita *Demokratia Periodo*?

Nenio. De 1977^a ĝis nun oni konstruis neniun akvodigon aŭ akvotranslokigon. Hispanio daŭre havas sekan kaj malsekan partojn pro nevolemo de politikistoj, kies unurua intereso estas kapti voĉojn en balotoj, do ĉar malsekaj aŭtonomioj protestis sensolidare al sekaj partoj de Hispanio —laŭŝajne pro envio aŭ ĵaluzo— protestas, la registaro de socialisma Premiero Jozefo Ludoviko Rodrigues Zapatero nuligis la projektitan Nacian Hidrologian Planon, vendante tiel sian integrecon kaj profito de Hispanio pro telero da mizeraj voĉoj, kiujn li finfine perdis pro siaj erara kaj senorientata politikoj.

Poste venis la registaro de dekstrisma Marjano Raĥoj, sed li ne kapablis malfari la sensencaĵojn de sia antaŭulo, aŭ pli verŝajne, ne volis pro la sama kialo: soifo pri voĉoj en venonta baloto. Kaj poste venis la nuna registaro, kiu estas miksaĵo de pluraj partioj, kiuj malsukcesis en la lastaj elektoj. Male al tio, kion oni povus esperi, ankaŭ Prezidanto Sanĉes ne

*Marjano
Raĥoj,
prezidinto
de Hispanio.*



reaktivis la NHP^{on}, kaj mi dubas, ĉu la venkinto de la lasta baloto, S-ro Alberto Nunjes Feiĥoo reaktivigus ĝin, eĉ se estas evidenta, ke malsoifigi la malsekan Hispanion estas devigo kaj neceso por nia lando.

Ja la fino de la diktatoreca periodo, Hispanio eksportis elektriĉon al aliaj landoj. Nun, pro tiu malestimo al NHP kaj al nuklea energio, ni devas importi ĝin koste al nia malplena poŝo.

Male, ĉi nuna registaro detruas akvodigojn kaŝe al la popolo, pro stulta politiko eŭropa de ekologiistoj.

Ŝajnas, ke en Hispanio ankoraŭ devas veni politikisto, kiu konsideros, ke la intereso de la nacio estas pli grava ol tiu de sia partio aŭ ideologio, aŭ ol la dependeco de Eŭropo, al kiu Hispanio ŝuldas nenion, krom bojkoton kaj malriĉecon. Ĝis kiam li aŭ ŝi venos, ni devos labori por atingi kontrolon de niaj politikistoj per iu ajn metodoj, kiujn ni povos devizi.


Trilogio pri la Intercivitana Milito Hispana

Jozefo Maria Gironella Pous estis hispana verkisto, kiu gajnis la premiojn Nadal, Planedon, Nacian pri Literaturo, kaj Ateneon de Sevilo, sed kies famo kuŝis ĉefe en sia trilogio pri la Hispana Intercivitana Milito, kiu fakte konsistis el kvar kaj ne tri libroj.

Je 1953 li gajnis la Nacian Premion pri Literaturo pro la unua volumo de la trilogio, *Ciproj kredas je Dio*, kie li priskribas la vivon kaj etoson de Familio

Alvear en Gerona, la ĉefurbo de la provinco, kie li naskiĝis je 1917^a, dum la jaroj de la Dua Respubliko, de 1931^a al 1936^a. Je 1961^a, ok jarojn poste, li publikigis la duan volumon, eble la plej diskonigotan tra la mondo, *Miliono da mortintoj*, en kiu li priskribas la militon mem, de la 18^a de julio de 1936^a ĝis la 1^a de aprilo de 1939^a, ankaŭ pere de la familianoj Alvear kaj ties amikoj. Ĉefrolulo estas Ignacio Alvear kaj ties amiko Mateo kaj fratino Pilar Alvear. Kvin jarojn poste, je 1966^a, li prezentis al la publiko la trian parton, *Paco eksplodis*, per kiu li prezentas la sekvojn de la milito kaj la unuan parton de la diktaturon de Generalo Fransisko Franko.

Notinde estas, ke je la komenco de la milito, la aŭtoro aĝis 19 jarojn, kaj li iris en Francion de la respublika zono en Katalunio al Vaskolando, kie li aliĝis al la ribelinta armeo. Pro tio ni konkludas, ke multe el la informo, kiun li provizas en la dua volumo povas esti aŭtografia. Poste, je 1971^a, li denove traktis la saman temon per *Kondamnitaj vivi*, duvoluma novelo per kiu li gajnis la Premion Planedo, priskribante la vivon de burĝaj katalunaj familioj Vega kaj aliaj de la fino de la milito ĝis la jaroj 60aj de la lasta jarcento.





Hodiaŭ ne estas facile trovi tiujn librojn, ĉar historion oni provas tordi favore al nuna politiko, kaj se oni legas tiujn librojn verkitaj de samtempulo pri la eventoj priskribitaj, evidentiĝas, ke *la nuna vero* pri tiu periodo estas pura menso. La libroj estas verkitaj per klara kaj sentema stilo, kaj laŭ mi ĉiu hispano nuna devus legi ĝin kaj poste elteni sian propran opinion pri nia ĵusa historio. Mi mem trovis la librojn en vendejoj de antikvaj libroj, sufiĉe malmultekoste. Ekzistas retejo, kiu faciligas al oni trovi tiujn librojn kaj aliajn ne plu eldonitajn:

<https://www.iberlibro.com>

Hodiaŭ homoj vivas kaj parolas kvazaŭ tiu terura milito neniam


okazis, kaj mi opinias, ke tio estas



grava eraro. Jam Herodoto, greka historiisto de pasinteco, asertis, ke *Popoloj, kiuj forgesas historion estas kondamnitaj ripeti ĝin*, kaj tio ne estas banala penso, ĉar la afero ripeti estas milito terura kaj sangavida. Oni ade mensogas pri tio, kio okazis tiam, kaj se oni kontraŭdiras tiujn mensogojn, oni estas fifamigata per la *faŝisma* insulto, ignorante —aŭ forgesante— ke faŝistoj estis maldekstremuloj perdifine.

Maniero defendi sin kontraŭ tiaj mensogoj estas legi librojn historiajn, kaj aliajn verkitajn de homoj, kiuj vivis tiujn terurajn jarojn, kiel José María Gironella.

Rakonto pri Travidebla Reĝo



Rosa Montero skribas tre bone. Mi legis du librojn de ŝi, ĉi tiun kaj *La ridinda ideo neniam vidi vin*, kiu estas tre bone verkita, malgraŭ ties irado de frivolemo al frivolemo. Sed en *Historio pri la Travidebla Reĝo* la stranga humuro, kiun montras Rosa Montero, fariĝas ŝerco por la leganto kiu, blindigita de ŝia bona verkado, promesas rakonton de intrigo, varia kaj antaŭvidanta, ke ĉio iros al humura, amuza, sensacia fino.

Sed tio ne okazas. Tri jarcentojn da historiaj eventoj estas premitaj en la 25 jarojn de la vivo de Leola, la ĉefrolulino, 15-jaraĝa kamparana knabino, kiu estas puŝita supren pro eksterordinaraj cirkonstancoj de tiu vivo de perforto, kiun la aŭtorino prezentas al ni je la komenco de ŝia vivo. Rosa Montero konfesas je la fino de la libro, ke ŝi enmetis anakronismojn en la historion, kvazaŭ rekonu ilin estus malpermeso fari ilin.

Laŭlonge de la libro ni atestas la strangan fenomenon, ke ĉiun fojon, kiam iu komencas diri la *Rakonton de la Travidebla Reĝo*, okazas al li io malbona, kiu malebligas la rakontadon: lampo aŭ baldakeno de lito falas kaj mortigas rakontanton, aŭ hazarda ŝtono faras same. En kofro gardata de abatino de monaĥinejo aperas tamen kodekso en kiu tiu rakonto estas rakontita, tiu de la *Travidebla Reĝo*, sed la trovantinon malkovras la monaĥino kiam ŝi malfermas la libron ĝustatempe por ke ni ne konos la rakonton.

Kiam la romano finiĝas, sur la mita kelta insulo Avalon, kie estas freŝaj fruk-

toj dum la tuta jaro, oni proponas al ni, kiel apendico, la tekston, kiun ni supozas, ke Leola trovis en la kofro de la abatino: *La rakonto de la la Travidebla Reĝo*. Kaj dum du paĝoj ni fin-

fine legas ĝin, sed kiam la solvo de la problemo de la reĝo alproksimiĝas, kiam ni ekscios kion la saĝa Drako diras al la Reĝo, meze de frazo, la leganto turnas la paĝon por trovi sin antaŭ du malplenaj paĝoj, ke ĉar ili ne havas eĉ numeron, kaj poste en la sekva estas la dankoj de la libro, kaj klarigoj pri anakronismoj, sed mankas la konkludo de la rakonto, kaj sekve ni neniam scias pri tio, kio okazas al la Reĝo, kaj kio la solvo estas.

Resume, ĝi ŝajnis al mi ne nur ŝerco, sed ankaŭ manko de respekto al la leganto. Tial, malgraŭ la agnosko de la merito de Rosa Montero pro sia bona verkado de la romano, mi donas al ŝi nur unu stelon el kvin. Mia konsilo estas ne legi ĝin, ĉar la rakonto estas same falsa kiel la bildo sur la kovrilo, ĉar Lady Godiva havas nenion komunan kun la rakonto ene de la libro.

Kaj, se malgraŭ ĉio, vi decidis legi ĝin ĉar vi senkondiĉe adoras la verkistinon kaj vi ne kredas tion, kion mi legas ĉi tie, sciu, ke vi povas serĉi ŝin en Fejsbuko kaj peti el ŝi kalrigon, kion mi certe pretas fari.

Politike Pacismo kiel misvaloro ideologia de sklavoj


Pedro Manuel González López

Ĉefa valuto de socialdemokratio estas pacismo ideologia. Ĝi estas ilo de potenco por subigi la amasojn sub la aspekto de virto. Ekde antikvaj tempoj, tiuj en povo frekventis psikologiajn kontrolmekanismojn por malaktivigi la kapablon reagi de civitanoj. La altrudo de pacismo kiel nerompebla dogmo estas parto de tiu strategio de regado.

Ideologia pacismo ne estas racia sinteno bazita sur politika prudento aŭ la saĝeco de modereco, sed prefere *infanigita ideologio kiu neas la realecon de konflikto kiel la mova forto de historio kaj leĝo* (Ihering). Libereco ne estas donebla, sed ĝi estas konkerenda. Kaj ĉiu konkero implicas konfrontiĝon, lukton kaj oferon. Sen konflikto, ne estas venko; sen rezisto, ne estas emancipiĝo. Sed la ideologia pacismo celas ekstermi el la spirito de la civitano ĉian naturan inklinon defendi justecon kaj veron, lasante ĝin sendefenda kontraŭ subpremo.

Historio instruas al ni, ke neniu granda politika aŭ socia

transformiĝo estis atingita tiamaniere. De la Angla *Gloria Revolucio* ĝis la sendependeco de



Panelaj afiŝoj diras:

- 1 Amo, ne defendo.
- 2 Faru ne defendon.
- 3 Ne al milito.
- 4 Faru amon, ne defendon.

Usono, de la Franca Revolucio ĝis la kontraŭfranka rezistado, ĉiuj grandaj emancipaj heroaĵoj postulis decidita konfrontiĝo kontraŭ maljusteco. Ideologia pacismo, aliflanke, predikas neagadon, rezignacion kaj konformecon kun maljusta ordo. Ĝi ne estas doktrino de paco, sed de servuto.

Ne temas pri altigi senpagan perforton aŭ fali en detruan nihilismon, sed prefere kompreni, ke vera paco ne estas foresto de konflikto, sed justeco atingita per decida agado. Alfronti tiranan potencon, kontraŭstarantajn

strukturojn de regado, malakceptante la submetiĝon trudata de la dogmoj de naiva pacismo: jen respondeco de ĉiu regata homo, kiu aspiras al libereco.

La ideologia pacifismo estas la opio de la popolo, kaptilo, kiu paralizas la volon por transformo kaj plifortigas la regadon de la elitoj super la dominatoj. La historio ne antaŭeniras per preĝoj aŭ petegoj, sed kun la konscia kaj decida agado de liberaj homoj. Kiu rezignas batali por justeco ankaŭ rezignas la dignon de sia ekzisto.

Kaj kion ni povas diri pri la pejzaĝo, la estetiko kombinita kun tiu falsa etiko? Kontraŭ-militaj bubaĉoj pro kontraŭ-militaj standardoj. Kion vi volas

diri, **ne al milito**, kvazaŭ temus pri principo? Ĉiukaze, **ne al ĉi tiu milito**. Certe **ne al sklaveco al eksterlandaj potencoj** kaj ĉantaĝi por ilia profito sen io kontraŭa. Certe ne al la altrudoj de eŭrokratoj aŭ usonanoj, kiam eĉ la plej baza reciprokeco en juĝa kunlaboro ne estas respektata. Eĉ ne unu hispana soldato en Orienta Eŭropo dum ekzistas neniu pola aŭ rumana soldato sur gardo en la Kanarioj, Ceŭto aŭ Melilo. Sed ĉiu respondeca ŝtato, sen menciis registaron, devus prepariĝi por ajna eventualaĵo, pro la nuna situacio. Kaj tio kompreneble implicas modernigon kaj investon pri defendo.

Ĉar ne estas same pacema kiel pacisma aŭ pacifista.

Venas el paĝo 23^a

kiu estas fremda al ni kaj ni toleras pro la premo de publiko, ĉu ni vidas ĝin justa ĉu ne.

Se en Hispanujo ekzistus demokratio, resume, en Hispanujo ekzistus demokratioj. Sed tio, kion mi trovas inter miaj samcivitanoj, estas homoj, kiuj ne volas skui la kapon pro publikaj aferoj, kiuj tuŝas nin ĉiujn, kvazaŭ ili tuŝus neniun. Tial aferoj iras tiel. Ĉar ni ne estas demokratioj — entute — kaj sekve ni havas neniun rajton al demokratio.

Se ekzistus demokratio en

Hispanio, mi ne skribus ĉi tiun artikolon, kaj vi certe ne povus legi ĝin. Ni havus nek tiun registaron, kiun ni havas, nek la deputitojn, kiujn ni havas, nek estus pli ol 200 mortintoj en Valensjo.

Ĉar respondeca civitano postulas kaj akiras civilan kaj kriman respondecon de politikistoj, kaj Hispanio estus pli bona loĝloko. Sed nerespondecaj civitanoj iĝas subjektoj atendantaj la venontan Cezaron por starigi sin en potencon. Jen tie, kie ni estas..., bedaŭrinde.

Beletre **Sireno de Serenin'** Enkonduko.

Oni diras, ke sirenoj estis origine birdoj kun kapoj de virino, sed feliĉe la vero venis laŭlonge de la tempo kaj por la plebo ni *retr-ovis* la fiŝvoston, kiun ni neni-am ĉesis havi kaj en kiu loĝas nia memo kaj nia saĝo.

Ni sirenoj estas sur la planedo **Teluris** dum milionoj da jaroj. Homoj konas Teluris kiel **Tero** ĉar ili havas malmulte da imago kaj kredas ke tio, kio gravas estas tio, kion ili paŝas, kvankam ĝi estas la plej malgranda parto de la tuto. De la kresto de niaj ondoj ni vidis la dinosaŭrojn veni kaj foriri kaj multajn aliajn speciojn, inkluzive de homoj, al kiuj ni baldaŭ adiaŭos, pro nia sperto observante la ciklojn de la malsamaj specioj, kiuj venis kaj iris tra nia historio nia longa historio, kiun ni taksas je pli ol miliardo da jaroj, de kiam la planedo malvarmiĝis sufiĉe por ke Essa, la unua marvirino, aperis sur la vizaĝo de tiu ĉi roko kun akvo kaj aero.

Essa venis el sinsekvaj specioj de marbestoj, kaj vivis sole ĝis ŝi lernis reproduktiĝi per partenogenezo. Io misfunkciis, kaj ŝiaj dek tri infanoj ne fartis bone.

Kelkaj mortis baldaŭ post naskiĝo, aliaj daŭris jardekojn, kaj nur tri inoj kaj du maskloj sukcesis

vivi jarcenton. Iom post iom ili evoluis, tra cent generacioj, kaj ni atingis ekstreman longvivecon, de tia grandeco, ke mi ne konas iun alian sireninon —eĉ ne mi mem— kiu mortis aŭ montras signojn de maljuneco, kiel diras la plej antikvaj el ni.

Vi eble surprizos, ke mi parolas en la ina kaj ne rilatas al virsirenoj. Ili ekzistas inter ni, sed vi malkovros tra ĉi tiu rakonto, kial la vira sekso havas tiom malmulte da graveco inter ni, sireninoj. Kaj kial ili daŭras tiel malmulte? Pro tio sirenoj estas memdifine inoj, kaj tiuj maskloj estas nur virsirenoj.

Mi ne volas enuigi vin per ĝeneralaĵoj, do mi rakontos al vi mian historion. Estu via respondecokredi, ĉu ĉi tio estas vera ĉu ne. Ni sirenoj ne ĉesos ekzisti,



nek komencos fari tion, ĉar vi dubas aŭ ĉesas dubi pri tio, kion mi diras al vi malsupre.

2 Mi, Serena.

Mi naskiĝis sur insulo en la Mediteranea Maro, proksime de la afrika kontinento. Kelkaj el ni naskiĝas en la maro, sed sirenoj preferas naski surtere, por ke la bebino povu uzi siajn pulmojn, ĉar la blankoj malfermiĝas en niaj flankoj kaj aŭtomate estas uzataj tuj kiam ni elĉerpas la aero. Male, kiam ni naskas en akvo, la blankoj de la bebo malfermiĝas aŭtomate, kio multe pli malfacilas al ŝi malfermi la pulmojn al la ĉirkaŭa aero, kiam ŝi eliras surtere, kaj ŝi povas droni se ŝia patrino ne intervenas. rapide. Kiam marvirino venas, ŝi rampas, uzante la manojn por helpi ŝin, ĝis ŝia vosto sekiĝas kaj nia abdomeno formiĝas, kun tre blankaj kruroj, ĉar ili ne estis elmetitaj al la suno. Normale ni elmontras la inan sekson, kio estas natura por ni, sed se ni faras mensan penon antaŭ ol forlasi la akvon ĝis niaj kruroj sekiĝos, ni povas fariĝi sirenoj laŭplaĉe. Tio ne estas io, kion ni faras ofte, krom por repro-

duktaj celoj, ĉar ni estas viviparoj kaj tial bezonas la helpon de la masklo.

Mia patro, Nefrenjo, konservis sian sekson dum 20 jaroj, ĝis mi plene disvolviĝis, ĉar li diris, ke li bezonas viran rolmodelon. Ŝi tiam fariĝis Nefrenino kaj estis la plej bona amikino de mia patrino. La patro de mia fratino tamen estis Ŝelo, kiu kelkajn tagojn post la akuŝo revenos esti Ŝelino ĉar ŝi diris, ke ŝi ne povas elteni tion. Feliĉe por Siele, mia patro kaj mi adoptis ŝin kaj instruis al ŝi ĉion, kion li scias, antaŭ ol reiniĝi, kiam ŝi estis dek kaj mi dudek jaroj jaraĝaj.

Unu aŭ du jardekoj de aĝo estas ankoraŭ frua infanaĝo, kompare kun tio, kion sirenoj devas lerni por pluvivi kaj kion ni povas fari, ĉar nia longviveco estas tre longa kaj estas mezurita po jarcentoj.

Mia patrino, Irenja, neniam havis filinojn, kaj penis ŝi multe pli ol ŝi pensis alporti min en la mondon. Niksino povas havi idojn proksimume unufoje ĉiujn dek jarojn, do kiam mia fratino Siele naskiĝis, mi jam lernis multajn lertaĵojn por defendi min en nia vivmedio, la likva tavolo kiu kovras nian mondon.

Hehe, homo opinias, ke li

estas la reĝo de la universo, sed li kutime ne vivas ĝis cent, dum ni marvirinoj mortas hazarde aŭ pro sirena murdo, ĉar ne nur ni estas longevivaj laŭdifine, sed ankaŭ ni amas vivon. Homo estas kolombigita en landojn de pluraj dekoj da miloj da kvadrataj kilometroj, eble milionon, sed ni havas kvin miliardojn da kvadrataj kilometroj (aŭ preskaŭ ducent dek tri miliardojn da kubaj kilometroj) por multe pli malgranda loĝantaro de nur kelkaj centoj da ni. Kelkfoje sirenino mortas, sed tio estas tre malofta. Ni ne havas predantojn, kaj ni ne predas. Kelkaj el ni manĝas nur marajn plantojn, sed aliaj manĝas malsamajn speciojn de marbestoj, kvankam ne tiom troigite ke ni mortigas ajnan specion. Mia plej ŝatata bongustaĵo estas ŝarkoj, ĉar ili ne havas ostojn, kaj iliaj plej malmolaj partoj estas la dentoj en la buŝo, sed tiujn mi elkraĉas. Ŝarkoj manĝas ĉion, kion ili kaptas, ili estas voremaj, kaj ili freneziĝas pro sango. Tial mi iras por ili.

Kiel mi diris, mia patrino naskis min sur insulo en Mediteraneo, ni nomas ĝin Ischia, sed mi pensas, ke homoj nomas ĝin Kipro. Kiam ne estis homoj tie, ĝi estis paca loko, kun grandiozaj sunsubiroj. Sed jam de kelkmil jaroj ĉi tiuj homoj batalas unu la alian, kaj foje ili

surprizis iujn el mia speco kaj atakis ilin, ne sciante, ke nin timas ŝarkoj. Mia amikino Tiara iam estis atakata de du homoj, kaj ŝi defendis sin mordante kaj finante ilin. Tiam ŝi diris al mi, ke ili ne tre bone gustumas, kvankam ili estas tre nutraj. Ŝi devis multe naĝi por sintezi ĉiujn manĝaĵojn, kiujn provizis al ŝi tiuj du kompatinduloj. Ŝi restis preskaŭ unu monaton sen manĝi, kaj suferis de aerofagio kiu daŭris semajnojn. La vezikoj kiujn ŝi faris diris al la ceteraj el ni kie Tiara estis...

Mia patrino mamnutris min ĝis mia dekjaraĝo, kiam Siele naskiĝis. De tiam mia mentoro estis Nefrenjo, mia patro. Li instruis min kiel ĉasi, kaj respekti la fiŝpopulaciojn kiuj ne tre multombras. Li ankaŭ instruis min kiel rompi la retojn de fiŝkaptistoj kiuj kaptas ĉion, kion ili povas kapti, ne zorgante pri ekstermado de tutaj kolonioj, ĉu ili estas malplimultaj specioj ĉu ne. Ni rompis iliajn retojn kaj eĉ ruinigas iliajn boatojn logante ilin sur la rokojn per niaj kantoj, ĉar kiam en kontakto kun la aero nia voĉo estas melodia kaj ni kantas en duetoj kaj triopoj tre bone. Ili vidas nin, kiam ni elŝovas niajn korpojn el la akvo, kaj ili estas blindigitaj de niaj haroj kaj niaj mamoj, kredante, ke ni estas de sia speco, kaj ili venas al ni. Ili

alfundiĝas siajn ŝipojn sinke kaj se ili ne ĝustatempe saltas marborden, la ŝarkoj —kiuj ankaŭ aŭdis niajn kantojn kaj scias, ke ili estas antaŭludo de festeno— aperas kaj kaŭzas buĉadon. Ni lasas ilin fari tion, ĉar ili bezonas tri tagojn por sintezi la viandon de la terbestoj kaj tiam la ŝarkoj gustumas pli bone kiam ni manĝas ilin.

Nefrenjo ankaŭ instruis min distingi subakvajn fluojn kaj uti-
ligi ilin por navigi pli rapide kaj kun malpli da peno, kaj ankaŭ ĝuste interpreti la mesaĝojn, kiujn ili alportas al ni per koloro,odoro, gusto, sono kaj temperaturo.

Sunlumo —de ruĝa ĝis viola — ne multe penetras en la maron. Kiam ni emas, ni grimpas al la surfaco kaj kuŝas surdorse, ricevante la radiojn de nia stelo dum horoj. Foje venas delfeno kaj ludas kun ni, kaj ni multe babilas. Alifoje ni endormiĝas rigardante supren aŭ malsupren, kio donas al ni pli malhelan haŭtnuancon. Mi ŝatas, kiam la ondoj levas min, kaj mi rigardas el la kresto la ĉirkaŭan maron. Foje mi rajdas la ondon senĉese, tiel ke mi ĉiam estas sur la kresto, kaj ŝajnas al mi, ke mi estas sur la supro de senmova monto en la maro, kvankam vere mi moviĝas kun la ondo al la malferma maro aŭ al la plaĝo, kaj Kiam mi atingas ĉi tiun punk-

